



madrida esperanto-liceo

oktobro 2026

STIPENDIOJ POR LA KURSO EN UNED

Kiel ni informis en la pasinta bulteno la enskribiĝo por la nova eldono de la kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) komenciĝis la 8-an de septembro, kaj daŭros ĝis la 21-a de oktobro. Oni malfermis tri nivelojn: A2, B1 kaj B2. Pliajn informojn legu ĉe: <https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html>.

Memoru ke anoj de Hispana E-Federacio ĝuas grandan rabaton, kiel kunlaboranta asocio.

Madrida Esperanto-Liceo ofertas stipendiojn por helpi pagi la UNED-Esperanto-kursojn por la akademia jaro 2026/2027, por iu ajn el la tri proponataj niveloj: A2, B1 kaj B2. La estraro aprobis buĝeton de 1000 eŭroj por ĉi tiu celo. Ni ĉi-sekve resumas la kondiĉojn.

La stipendioj kovros maksimume duono de la efektiva kosto de kursregistriĝo (ĉu normala aŭ reduktita tarifo), ne kovrante aliajn elspezojn, kiuj povus rezulti el partopreno en la kurso. La stipendio estos pagita en du partopagoj: komenca pago de 50% de la tuta sumo post konfirmo de la registriĝo, kaj la ceteraj 50% ĉe la fino de la kurso, kondiĉe ke la sube skizitaj pravigaj postuloj estas plenumitaj. Kandidatoj devas pagi la kurskotizon antaŭ ol kandidatiĝi por la stipendio kaj konsenti kompletigi la kurson kaj fari la finajn ekzamenojn.

Kandidatoj devas loĝi en la Komunumo de Madrido, sendepende de sia nacieco. Se, pro la nombro da kandidatoj, ne eblas doni la helpon al ĉiuj pro elĉerpiĝo de la asignita buĝeto, prefero estos donita al individuoj, kiuj estas membroj de Esperanta asocio (loka, regiona, nacia aŭ internacia), kiuj ne laboras (studentoj aŭ senlaboruloj), aŭ kiuj, dum dungitaj, spertas financajn malfacilaĵojn, laŭ tiu ordo de prefero.

Plenan dokumenton en la hispana vi povas ricevi en la adreso <https://mel.esperanto.es/index.php/67>, aŭ skribante al la adreso: madrid@esperanto.es.

La kandidatiĝojn oni devas sendi al la adreso de MEL antaŭ la 30-a de novembro 2026, pere de la formularo trovebla en la supra adreso, aldonante dokumentojn por pravigi la kondiĉojn.

Alvoko por instruisto

Krome, HEF serĉas konversacian gvidanton en la Esperanto-kursoj, kiujn ĝi ofertas ĉe la UNED. Temas pri gvidi du horojn da konversacio monate por la studentoj de ĉiu el la tri ofertataj niveloj (A2, B1 kaj B2), de novembro 2026 ĝis majo 2027. Tio estas, ses unuhoraj sesioj monate.

La sesioj okazas per videokonferenco ene de propra servilo de la UNED mem. Necesas disponi pri komputilo kun kamerao kaj mikrofono kaj bona interreta konekto.

Evidente necesas ankaŭ altnivela scipovo de la lingvo Esperanto rilate al parola esprimkapablo. Estos konsiderataj kiel meritoj: Esperanto-diplomo je la nivelo C1, studoj rilataj al Esperanto, sperto pri lingvoinstruado, sperto pri distanca instruado.

La laboro estas mone kompensata, sed iel simbole.

Kandidatiĝoj venu al admin@esperanto.es ĝis la 15a de oktobro.

ĈEESTA KURSO DE ESPERANTO EN NIA SIDEJO

En tiu ĉi monato oktobro komenciĝos nova ĉeesta kurso de Esperanto en Madrido por komencantoj. Ekde la 20a de oktobro 2025 ĝis februaro 2026, ĉiujn mardojn ekde la 18,30 h. en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, str. Rodríguez San Pedro, 13 (metrostacio San Bernardo aŭ Argüelles). La instruisto estos denove Javier Vílchez.

Informu viajn amikojn kaj ĉiujn kiuj povas esti interesitaj. Oni povas enskribiĝi per simpla mesaĝo al madrid@esperanto.es.

JAM KOMENCIĜIS LA PRETIGADO DE LA HISPANA KONGRESO DE 2027

La 85a Hispana Kongreso de Esperanto okazos post unu jaro, do komence de oktobro 2027, en la ekstrema urbo Herrera del Duque. La preparoj komenciĝis jam, kaj vi povas trovi la unuajn informojn pri la renkonto en la retadreso <https://kongreso.esperanto.es/>.

Tie troviĝas ankaŭ la aliĝilo. La kotizoj estas jam tre altiraj, speciale por frua aliĝo. Krome estas apartaj avantaĝoj por junuloj kaj por eksterhispanianoj. Vidu la detalojn en la aliĝilo.

Konekse kun tiu evento, ni informas pri tre speciala okazaĵo, kiu montras la apogon de la urbaj aŭtoritatoj: la kunvoko de premio de poezio en Esperanto, kiu portas la nomon de la madrida poeto Miguel Fernández, organizita de la urbestro de Herrera del Duque, kunlabore kun Hispana Esperanto-Federacio kaj Fondaĵo Esperanto.

Vidu detalojn de ambaŭ okazaĵoj, la kongreso kaj la poezipremio, en la retejo: <https://www.esperanto.es/eo/>.

**PLIAJ RENKONTIĜOJ**

Dum la venonta "ponto", t.e. la semajnfino kaj la festo de la 12-a de oktobro okazos du gravaj renkontiĝoj sufiĉe proksime por ebligi la partoprenon de madridanoj.

En Malago, la 22-a Andalucia Esperanta Kongreso okazos inter la 9-a kaj 12-a de oktobro, lige kun la kunveno "Esperanta Naturamikaro". Vi povas trovi detalojn pri loĝado kaj la programo, kaj ankaŭ registriĝi, en ĉi tiu retejo: <https://www.esperanto.ac/>.

Ankaŭ dum la oktobra longa semajnfino, la 41-a Kataluna Esperanta Kongreso okazos en la urbo Reus. Vi povas trovi detalojn en la retejo: <https://kongreso.esperanto.cat/eo/>.

Fine de novembro, inter la 26-a kaj 29-a, okazos la 7-a Virtuala Kongreso organizata de UEA, kun la ĉeftemo: "Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo". Vidu la detalojn kaj aliĝu ĉe: <https://vk.esperanto.net/2026/>.

MADRIDAJ RENKONTIĜOJ

La unuasabata kunveno okazos la 3-an de oktobro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, 2. Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto Bluesky, en la adreso: <https://madridaliceo.bsky.social>.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŝacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo <https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g>

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.

madrida madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

Redaktas Toño del Barrio

madrid@esperanto.es

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

